TEA-BULTENO

16ª JARO | SEPTEMBRO - OKTOBRO 2013 | NUMEROJ 9-10

Bonas vivi, sed eĉ pli bone estas revi, kaj pli ol ĉio, vekiĝi.
Antonio Machado (1875-1939)

Ssluton, karaj gelegantoj!

Ĉu bone vi pasigis la someran tempon? Kie kaj kiel vi malstreĉiĝis? Ĉu ĉemare aŭ surmonte? La libertempa periodo baldaŭ finiĝos, kaj jam ĉesojlas la momento ree laboradi kaj aktivadi. Kio atendos vin? Ĉu organizado de iu Esperanto-renkontiĝo? ĉu iu seminario pri instruado? Aŭ ... eble io alia?!? Ĉiaokaze, Triesta Esperanto-Asocio malfermos sian pordon **vendrede la 6an de septembro, je la 19a horo**. Eĉ ne bezonatas aldoni, ke ni atendas vin, multnombraj: ni scivolemas pri rakontoj de viaj renkontoj kun samideanaro ie tra la mondo, pri viaj vojaĝoj al Islando aŭ Brazilo aŭ aliloken, pri la novaj spertoj travivitaj danke al nia kara lingvo. Sed, por ke ni daŭrigu ĝui la multajn eblecojn donitajn de Esperanto, necesas ankaŭ agadi, agadi por disvastigi kaj konigi nian IL-on en la loka medio, por konvinki homojn pri la ekzisto de tia demokrata solvo al tuthomara interkompreniĝado... Se ni silentas kaj kaŝiĝas en nia niĉo, kaj nur ludas kvazaŭ sektece pri gramatikaj diablaĵoj, neniu ekscios pri Esperanto kaj ties praktikaj utiligad-povoj. Nenion novan mi estas diranta, ĉu ne? Do, se vi plene konscias pri la valoroj de nia lingvo kaj pri ĝia grava rolo precipe en nuntempo ankaŭ cele al konservado kaj protektado de ĉiuj naciaj lingvoj, kaj precipe de la itala kiu troviĝas en tre danĝera situacio, ĉefe pro daŭra angligado de terminoj ĝis hieraŭ aŭ antaŭhieraŭ uzataj en la norma lingvo, venu al TEA, ĉeestu niajn programojn, helpu la estraron antaŭenigi ideon kiu plifaciligus la interhomajn rilatojn, defende ankaŭ de la mondaj lingvoj. Bonan legadon kaj ek al agado! **Via Elda**

Kiam eĉ samlingvanoj ne interkompreniĝas!

Antaŭ proksimume dek kvin jaroj, en iu bela somera tago, mia filo, loĝanta en Torino, revenis al sia naskiĝurbo akompanate de tre bela junulino, kiu - post kelkaj jaroj - iĝis lia edzino kaj konsekvence, laŭ la bo-aj reguloj, mia bofilino.

Ĉio estis (legu: DEVIS esti!) perfekta en tiu tago: mi vestis min tre elegantstile, male al miaj kutimoj sed fronte al miaj timoj (ja la unua impreso tre gravas en unuaj kontaktoj!), pretigis frandindajn manĝaĵojn, tipe triestajn, purigis hejmon plenpolure kaj kun ioma maltrankvilo atendis la gealvenontojn. Kompreneble ke ankaŭ mia edzo estis tagnokte engaĝita en ĉi laborado: kaj ne nur! Eĉ dum tiuj preparlaboroj ni ambaŭ ekzercadis paroli ... itallingve! Jes, ĉar kutime ni parolas triestadialekte.

Nu, ĉio tre glate iros, ni ne nervoziĝu: ja, diable! kion teruran ni povus fari!

Sonorado: jen ili! Lasta rapida ŝprucado de tre delikata parfumo sur min kaj edzon kaj tra ĉiuj ĉambroj de la loĝejo kaj jen: "Bonvenon, bonvenon! Eniru! Sidiĝu! Mi estas... Vi estas... Li estas... Ĉu komforta la vojaĝo...". "Kia ĝojiga plezuro ekkoni vin!" Ordinara, iom tro formala interparolado, tial mi, iom pli poste, per mia plej afabla voĉnuanco, aŭdacis diri iom pli familiece: "Ho, kian belan *kotoleta*-n vi havas!" La kompatindulino alrigardis min, rigardis kun demandosigno enokula mian filon, emis ion komenti sed ne sciis kion. Intervenis la interpretisto, dirante: "vidu, karulino, *kotoleta* ne estas 'kotleto' sed simple 'jupeto'". Tiun klarigon sekvis severa alrigardo kaj flustra siblado de mia filo al mi: "Bv. paroli itallingve!"

Kiel al dio plaĉis, pasis tiu unuamomenta embaraso, kaj feliĉe ĉio posta tre flue kaj glate iris ĝis la momento de la 'Bonan nokton!' "Nu, gekaruloj! Ĉu morgaŭ vi intencas iri al banejo[1)]? Mi tion deziras scii, nur por ke estu preta ĝustatempe la matenmanĝo." La okuloj de mia filo lanĉis fulmojn; mia edzo, duonkaŝe, kubutumis min ĉe la riparo, dum la brunaj okuloj de mia onta bofilino iĝis eĉ pli grandaj kaj rondaj, ol ili normale estas: '*Pro Jupitero, kion mi eligis el mia buŝaĉo ĉi-foje!?!*' - mi enpensis. Mia filo elbuŝigis, per voĉo akra kiel klingo de razilo, ke eble jes, eble ne, kaj kun ŝi tuj aliris al nia tute apuda, dua loĝejeto. Post dek minutoj, li revenis, sola, nigramiene: "Nu, panjo, ĉu ci scias kion ci estis dirinta? Ci demandis ŝin, ĉu morgaŭ ŝi 'iros necesejen'. Ŝi grumblis pro ci, ke ci estas tiom maldiskreta, informiĝante pri tiaj intimaj aferoj; fine oni eĉ ne konas unu la alian, kaj do... Plie, ke fojfoje ŝi entute ne komprenas cian parolmanieron. Do, mia panjeto, klopodu esti atentema, se ci amas min! Nu, ni iru dormi, morgaŭ estos alia tago!"

Kia miskompreno! Sed pri "banejo", verdire, tiam ne mi kulpis: tiufoje ne temis pri dialekta vorto, ĉar ĝi estas tute itala esprimo, nur la fakto estas, ke por ni triestanoj ĝi signifas "mara banloko", dum en la itala, parolante pri ĝi, oni diras alie: 'mi iras al la maro, al la strando' ks, kaj la bandomon aŭ banlokon oni plej kutime nomas "*Stabilimento*".

La fakto estas, ke niaj prauloj el 1800-a jaro avangarde en tuta Eŭropo ekkonstruis la unuajn 'banejojn': Jes, tiel ili estis, ekde jam tiam, nomitaj!

La maro estis tiom loga, ĉefe ĉe la urba golfo, antaŭ la ĉefplaco, ke ĝi sugestis realigi la unuan banejon flosantan, firme ankr-

itan kaj facile alireblan per etaj barkoj. Ĝia nomo estis klasika, pompa, grandefekta: Banejo 'Neptuna Sojlo' *(Bagno Soglio di Nettuno).* Tiu ĉi banejo ekfunkciis la 24an de majo 1823. La proprietulo, Domenico Angeli [Doméniko Anĝeli], provizis ĝin per ĉiaj komfortaĵoj: vestŝanĝaj budoj, basenoj kies fundo leviĝis aŭ malleviĝis por reguligi la profundecon, varma kaj malvarma akvo, kafejo kaj trinkejo, kunvenejoj por viroj kaj virinoj, fumsalono k.a. Tiu banejo situis en pozicio ŝirmata de la ventoj, kie la marakvo estis pli travidebla kaj, dum la vintro, oni ĝin malkonstruis, por ĝin relokigi tie komence de la varma sezono. *Bagno Soglio di Nettuno* estis vizitata ĉefe de bonstata klientaro, itala kaj aŭstra.

En la sekvaj jaroj, konstatinte la grandan sukceson de tiu unua flosanta banejo, oni ekkonstruis aliajn samspecajn. En 1830 estis starigita, apud la lumturo *Lanterna*, la unua banejo rezervita al la aŭstriaj mararmeanoj, nomita "Militista naĝlernejo". Naĝekzercado estis ne nur rekomendita sed eĉ fariĝis deviga por la armeanoj. Ĝin vizitadis la aŭstriaj oficiroj/militistoj kaj ties familianoj.

En 1858 oni inaŭguris la luksegan banejon *Maria*, ĝuste vidalvide de la *Hotel de la Ville*, kiu povis gastigi samtempe pli ol 200 banemulojn.

Iom poste aperis la banejo *Boscaglia*, tiel nomita laŭ la nomo de ties unua proprietulo: ĝi estis same konstruita sur flosiloj sed tute centre de la urbo, antaŭ la ĉefa urba Placo Granda (nun Placo de la Italia Unuiĝo). Ĝi atingeblis per vaporŝipetoj kaj estis vizitata de aferistoj kaj oficistoj, kiuj povis tie pasigi kelkajn liberajn horojn de la labortago. Ankaŭ tiu ĉi estis malmuntebla fine de la bansezono.

Tiu rapida disvastiĝo de banejoj tiel amase vizitataj provokis tamen serion da plendoj far la konformista tavolo de la urbanaro, kiu plendis pro ... 'ofendego al komuna pudoro-sento' flanke de la banantoj 'en preskaŭa adamstila vesto': la bangastoj estis facile videblaj de tiuj kiuj promenadis laŭlonge la moleon Sankta Karlo (1864). Sed kiel estis tiam vestitaj, ekzemple, la virinoj? Per kompletoj kovrintaj ĝis la maleoloj, larĝaj ĉapeloj aŭ kufetoj ornamitaj per koloraj rubandoj, gantoj longaj ĝis la kubuto, neniam demeteblaj, el ŝamo aŭ kotono. Ĉu troe malvestitaj?

Pasio por la maro eknestis en la animo de la elita triestanaro, kiu ekĝuis senbride, dum la tuta semajno, la lukson de la multaj ekzistantaj banejoj. Sed tiu deziro naĝi, iom sunumi kaj pasigi belan tempon kun amikaro, tiom pli kaptis la popolanojn, kiuj tamen devis kontentiĝi per tiuj strandoj lasitaj liberaj de la Komunumo. En tiuj publikaj banejoj, ĝenerale, ekzistis du sektoroj: unu por la viroj kaj alia por la virinoj kaj infanoj. Se tio ne eblis pro la aparta, neampleksa strukuro de banejo, oni organiziĝis tiel, ke en la unuaj horoj de la matenoj kaj en la malfrua posttagmezo, povis aliri la strandon la virinoj, dum la viroj, kaj precipe la soldatoj, en la aliaj horoj. La komenco de ĉiu vico estis anoncita de la bangardisto duonan horon antaŭe.

La plej amata banejo (mita institucio ankoraŭ hodiaŭ ekzistanta!) de ĉiuj triestanoj estis inaŭgurita en 1903: temas pri la Banejo *Lanterna*, alinomita ŝerce *'Ciodin'* (Ĉjodìn) kaj, iom pli poste, ankaŭ *'Pedocin'* (Pedoĉìn). Komence tie nenia servo estis donita, eĉ ne ia framo sur kiu pendigi la vestaĵojn. Tial oni devis kunporti de sia hejmo najlon, kiun oni enigis en la lignajn tabulojn: tiu simpla kaj senkosta ago solvis la problemon. Pro tio la ŝerca nomo, en dialekto, 'Ĉjodìn'[2]. Sed kial 'Pedoĉìn'? Pri la origino de tiu ĉi kromnomo ekzistas diversaj anekdotoj. Laŭ kelkaj, ĝi devenus de la homamasiĝo komparebla al tiu de la pedikoj surkape (en la triesta dialekto *'pedoci'*). Sed *pedoci* signifas ankaŭ "mituloj"-n kaj konatas, ke en la foraj tempoj en tiu loko, nuntempe okupita de la banejo, oni bredis mitulojn. Maljunuloj, vivintaj en la periodo antaŭ kaj post la unua mondmilito, rakontis alian version: iam, inter la dua kaj la kvara posttagmeze, ĉiuj bangastoj devis foriri pro la soldatoj kiuj alvenis kun ĉevaloj kaj muloj por sin lavi. La bestoj estis ligitaj kie nuntempe troviĝas la vestdeponejo: ambaŭ, kaj soldatoj kaj bestoj, estis infestataj de pedikoj!!!

Kiel ĉiuj banejoj, ankaŭ tiu ĉi estis dividita en du apartajn 'zonojn': por-viran kaj por-inan. Nenia specifaĵo, ĉu ne? - tiam normalaĵo! En la 30-aj jaroj de la pasinta jarcento, ĉiuj strukturoj el ligno estis anstataŭigitaj per betonaĵoj kaj la dividaĵo interseksa iĝis masonita, fortika muro, dum sur la maro la apartigo estis indikita per flosaĵoj. Kaj tiu muro ankoraŭ nun samloke staras, jes, nun en la 2013-a jaro de la moderna epoko! Ĉiuokaze, la fidelaj vizitantoj eĉ ne volas aŭdi pri malkonstruo de la Pedoĉin-a muro. Antaŭ kelkaj jaroj, pere de urba ĵurnalo, oni anoncis referendumon, per kiu la loĝantaro estis demandita pri eventuala forfaligo de la muro. La decido estis unuanima: la muron neniu devas tuŝi! Triestanoj firme defendas tiun pli ol jarcentan institucion: eble anakronisman econ de urbo paradoksoplena sed ĝuste pro tio sendube konservendan kaj konservindan!

Post ĉi tiaj longaj historiaj klarigoj, mia onta bofilino ride komprenis, ke mi ne volis maldiskrete enketi pri ŝiaj necesejaj problemoj. *Elda*

Notoj:
[1] itale: *bagno;* elp: banjo
[2] el la itala '*chiodino*' [kiodino]= najleto

Laste trovitaj!

Post somera paŭzo, jen denove la rubriko "Laste trovitaj" pere de kiu oni konatiĝas kun elstaraj pioniraj esperantistoj aŭ pri interesaj grafikaĵoj, ĝenerale propagandcelaj, pri niaj lingvo aŭ movadaj eventoj. Nun estas la vico de iu tre grava esperantisto, kies personeco markis ekzemplodone 13 jarojn de nia historio. Bedaŭrinde tro frue la morto forfalĉis lin, lasante en granda konsterno la tiamajn agantojn.

Carlo Bourlet estas lia nomo: li naskiĝis en Strasburgo en 1866 kaj mortis en Annecy (Savojo) aŭguste 1913. Tre diligenta lernanto, li ricevis en 1891 la titolon de doktoro pri sciencoj per rimarkinda tezo pri ekvacioj. Jam en 1900 li publikigis plurajn disertaciojn pri puraj kaj aplikitaj mate-

sekvapaĝe

matikoj kaj kursojn pri Aritmetiko, Algebro kaj Geometrio, uzitajn poste en preskaŭ ĉiuj liceoj de Francio kaj eĉ eksterlande. Ekde 1906 li sindediĉis al instruado de mekaniko en la Pariza Konservatorio de Artoj kaj Metioj.

Komence de la pasinta jarcento, Esperanto estis ricevinta siajn unuajn sukcesojn en Francio, precipe danke al apogo de pluraj universitataj profesoroj. En tiu tempo, la eminentaj pioniroj Laisant, Gariel kaj Sebert penis interesigi pri la IL-o la francan turisman societon *Touring-Club (**T-C**)*, dum, samperiode, Charles Méray[1)], profesoro pri matematiko en la Universitato de Diĵono, parolis pri Esperanto al Carlo Bourlet kaj... sukcesis lin varbi!



Li estis ege allogata de la simpleco kaj reguleco de la lingvo, precipe de la tabelo de la korelativaj vortoj, 'mirindaĵo de klareco kaj lerteco'. Ekde 1900 plenenergie kaj senhalte li klopodis diskonigi la lingvon kaj akiri novajn adeptojn. Unua komuna, grava sukceso estis, ke ***T-C*** malfermis kurson, gvidotan de de Beaufront, aprile 1901, en sia societa sidejo. Pro troa aliĝantaro, oni devis dividi la grupon en du klasojn, tial ankaŭ Bourlet komencis instrui, malgraŭ ke lia kono pri la lingvo estis preskaŭ samnivela kun tiu de la kursanaro. Tamen tre brile li sukcesis!

En la revuo de ***T-C***, tiam legata de 100 000 personoj, aperis ĉiumonate liaj artikoloj pri Esperanto.

Sekve de lia klopodado li ricevis la permeson okazigi en la *Sorbonne* mem ĉiusemajnajn kunsidojn de la Pariza Grupo, kiun li prezide estris. Danke al tiu senlaca agemo, pli kaj pli kreskis la interesiĝo pri Esperanto ne nur en Parizo, sed ankaŭ tra la tuta Francio. Pro lia iniciatemo kaj sekva intertraktado kun d-ro Zamenhof kaj de Beaufront, tiam prezidanto de la Societo por propagando de Esperanto, la fama firmao Hachette decidis publikigi ĉiujn verkojn de ili du kaj de aliaj aŭtoroj, kies librojn la Majstro akceptis provlegi kaj rekomendi: tiuj libroj aperis en la serio titolita "Kolekto aprobita de D-ro Zamenhof". Lia aktivado estis nekredeble amplekssega: en 1905 li kunlaboris en la organizado de la 1-a UK; en 1906 li fondis "La Revuo"-n kaj ĝin direktis eminente; verkis artikolojn por la francaj ĵurnaloj kaj zorgis pri la propagando tra la tuta lando; sekretariis por la ĵus fondita Internacia Scienca Asocio Esperantista; en 1909 organizis kun la LKK en Barcelono la "Florajn Ludojn"; kaj, fine, en la UK de Krakovo, li solene invitis la Esperantistaron al la 10-a UK en Parizo (1914), por kiu li jam estis farinta precizajn planojn, elektinta siajn ĉefajn kunlaborantojn ktp.

Abrupte, la Fato estis decidinta alie: post laborplena periodo li estis ĝuinta iom da ripozo, kune kun sia familio, antaŭ la partopreno en la Berna UK: tio estis la 12an de aŭgusto 1913. Manĝante kun la edzino kaj siaj du infanoj, apud lago, li englutis fiŝosteton, kiu bedaŭrinde alhokiĝis al lia ezofago. Post dek tagoj, dum kiuj oni penis ĝin fortiri sed vane, kaj post grandaj suferoj, li bedaŭrinde mortis.

La funebra enterigo okazis en Parizo kaj multegaj esperantistoj ĝin partoprenis, inter ili ankaŭ Zamenhof, kiu pri li tiel parolis: "Mi konis lin nur kiel Esperantiston, tamen tuj de la unua momento [...] li ĉiam staris antaŭ miaj okuloj kiel homo tiel grava kaj tiel meritplena, ke ĉiufoje mi pensis pri la sorto de Esperanto [...] ĉiam sur la unua plano staris antaŭ mi la bildo de Bourlet. [...] de la momento, kiam li aliĝis al nia anaro, en nian aferon enverŝiĝis ia nova energio... Al lia senlaca iniciatado, instigado kaj helpado ni ŝuldas grandan riĉiĝon de nia literaturo [...], al liaj iniciato kaj energia laborado ni ŝuldas la fondiĝon de gravaj institucioj, kiel ekzemple la Internacia Scienca Asocio kaj aliaj. Li laboris ne sole en sia lando kaj en sia urbo [...]. Ne ĉiuj esperantistoj scias, kiom multe nia afero ŝuldas al la kara foririnto. Venos la tempo, kiam ĉiuj esperantistoj ekkomprenos, kiel gravega estis la laborado de Bourlet, kaj tiam, ho ve, tro malfrue ili rekompencos al lia ombro tiun sendankecon, kiun li de kelkaj flankoj suferis, dum li vivis".

Kaj mi finu per la vortoj de Gabriel Chavet, kiu tiel klare kaj ameme priskribas la veran karakteron de tiu grandulo: "Carlo Bourlet posedis ĉiujn kvalitojn de la homkondukantoj. Li atentis pri la opinioj de ĉiuj, li amis la justecon, la toleremon, la bonkorecon, li estis simpla kaj lojala, ĉiam bonhumora. Por ni li estis mirinda ekzemplo de laboro kaj sindonemo. Kiam oni vidis lin akcepti ĉiujn taskojn, senlace klopodi, gaje labori, kun la sola prioritato esti utila al nia afero, oni entuziasme grupiĝis ĉirkaŭ li."

Ĉefe en hodiaŭa tempo necesus tiaj homoj!

[1)] **Charles MÉRAY** (1835-1911) fama franca matematikisto. Li instruis matematikon en la Universitatoj de Lyon (1866) kaj Diĵono (1867). Aŭtoro de tute originala traktato pri infinitezimala analizo, elpensinto de nova metodo por instruado de geometrio. Li hazarde eksciis pri Esperanto ĉe parolado farita en 1900 de lia kolego Lambert. Tuj frapita de la genia Zamenhof-kreaĵo, tre pasie li engaĝiĝis en vasta propagandado per gazetaj artikoloj, publikaj paroladoj, perletera informado kaj per personaj kontaktoj en la sciencaj rondoj. Krom Carlo Bourlet, li entuziasmigis Charles Laisant, Paul Appell, rektoron Boirac kaj multajn aliajn. En Diĵono mem li akiris la aliĝon de la Universitato, urbestraro, kaj aliaj eminentuloj. En 1901 li fondis kaj prezidis la Diĵonan grupon. Samjare, kun Sebert, li prezentis Esperanton al la Scienca Akademio. Li daŭrigis sian por-esperantan agadon ĝis sia vivo-fino.

Fontoj: EdE; Vikipedio; Biografio de Carlo Bourlet, verkita en 1914 de la 'Grupo Esperantista' Parizo

Tie kaj tie pluketante...

Esperanto-Radikala Asocio, kunlabore kun la Societo 'Dante Alighieri', organizis la "Premion Italianiadi", kampanjon favore de la itala lingvo kaj por justa protektado kaj valorigado ene de Italio. Lastan jaron la anglaj terminoj enirintaj la italan leksikonon pliiĝis je 342%. Ĉiu itala vorto anstataŭigita per iu angla signifas perdon de esprimkapablo en propra gepatra lingvo, sen konsideri pri la ekonomia aspekto. Ĉio ĉi reflektiĝas drame ankaŭ eksterlande, kie la itala lingvo pli kaj pli ne estas plu instruata en aliaj landoj, kiel ekzemple lastatempe en Svislando.

La premio celas inviti ree malkovri kaj renovigi la italan lingvon en amuza maniero, igante demokratie pli klaraj la anglajn vortojn, komunuzajn sed ofte ne tiom facile kompreneblaj de la plejparto de la italoj, per traduko al la itala. La tradukaĵon oni devas prikomenti, ĝin pravigante.

La premio estas publikigita en la sekcio pri konkursoj por studentoj de la Ministerio pri Instruado, Universitato kaj Esplorado, kies alireblo estas rezervita al lernejoj. (http: hubmiur.pubblica.istruzione.it/web/istruzione/concorsi)

La tuta regularo troveblas en la ttt-ejo:
www.italianiadi.it

Finiĝis la 80-a Itala Kongreso okazinta de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto en Castellara, apud Sanremo. Tre varia kaj interesa la programo, kiu disponigis al la partoprenantaro, pli ol 250-kapa, vastegan gamon da klerigaj amuziĝ-aranĝoj. Krom Esperanto-kursoj kaj seminarioj, okazis prelegoj de elstaraj esperantistoj (Davide Astori, Carlo Minnaja, Humphrey Tonkin ka), teatraĵoj, koncertoj, kaj kompreneble multegaj ekskursoj en la mirindaj ĉirkaŭaĵoj. Memore de la kongreso, oni eldonis du diversajn poŝtkartojn, kiujn oni povis dissendi stampitaj per speciala stampo (vidu la supran bildon). Interesatoj povas ankoraŭ ilin mendi rekte skribante al Giovanni Zanaboni, Via San Filippo 52; 58031 Arcidosso (GR) aŭ retmesaĝante al: giovannizana@msn.com

Demandoj direktitaj al triestanoj, sed... ne nur!

Por via plezuro, alia sinsekvo da demandoj pri la interesa urbo Triesto. Klopodu respondi kaj kontrolu ĝustecon de viaj respondoj **je paĝo 6a**. Bonan amuziĝon!

1) Kiu estis Johann Joachim Winckelmann? Kio okazis al li, en Triesto?
2) Piede de la Lumturo pri la Venko (*Faro della Vittoria*), estas ankro aparteninta al ĉasŝipo Aŭdaca (*Audace*): kial oni konservis ĝin?
3) La Lumturo pri la Venko, krom funkcii kiel luma montrilo indikanta la vojon al ŝipoj kaj aviadiloj, estas nacia monumento: kiom ĝi altas? 67,85, 85,10 aŭ 117,85 metrojn?
4) En Placo de la Borso, fronte de la Komercĉambra Palaco, staras ŝtona kolono, sur kiu estas la impona statuo de iu imperiestro. Kiu?
5) La romia teatro datiĝas de la 1a/2a jc pK. Sur ĝiaj ŝtuparoj, konstruitaj sur la natura deklivo de la monteto, povis sidiĝi ĉirkaŭ ses mil spektantoj. Kial ĝi estis konstruita ĝuste tie?

Nova specio de akvomelono - Nomo: Esperanto

La 1an de julio 2013 dum la kunveno de Esperanto-Ligo en Israelo okazis monda agrikultura inaŭguro, kun publika prezento de nova specio de akvomelono, kies oficiala nomo estas "Esperanto". Ĝia ĉefiniciatinto estas Malka (esperante: "reĝino") Zemeli, samideanino nekredeble aktiva kaj firme celstrebanta. Antaŭ pli ol du jaroj, ŝi decidis, ke iu noviga agrikultura produkto devus esti oficiale nomata "Esperanto" kaj sekve tuj ekagis! Lastjare en la jara agrikultura foiro, oni oficiale prezentis tiun novan varion de akvomelono nomatan "Esperanto", kiun komence de 2013 oni ekkultivadis grandskale en la dezerto de Aravà.
La preparo de la buŝa testado estis iom aventura: pri ĝi rakontas Gian Piero Savio en la Esperanta Retradio ĉe
http://esperantaretradio.blogspot.co.at/2013/07/la-akvomelono-esperanto.html)

Nomo de vario	Tipo de frukto	Pezo (Kg)	Formo de frukto	Koloro de ŝelo	Mallonga priskribo	Bildo
Maxima-F1(Maximus PBR)		9-10	Iomete ovala	Larĝaj tre malhelaj strioj	Tre dolĉa malhele ruĝa pulpo	
Fusion-F1 PBR		6-8	Ronda	Larĝaj malhelaj strioj	Tipo "Maxima" mezgranda	
Bingo-F1 (Bungi)		6-7	Ronda	Tre malhela verda ŝelo	Tipo "Palomer"	
Esperanto-F1		4-6	Ronda	Mallarĝaj verdaj strioj	Mezgranda sensema	

Argentinanoj invitas infanojn kaj junulojn al desegnaĵ-konkurso

Konkursa temo:
Arboj de la mondo. Arboj de Vilaĝo Karlo Paco
Estas invititaj ĉiuj infanoj kaj gejunuloj (ekde 9 jaroj ĝis 18 - divididaj en 3 kategoriojn) partopreni en konkurso pri desegnado kaj pentrado, realigota en la parko-bieno "La Quinta" en Vilaĝo Karlo Paco - Argentino.
Dorse de la verko devas esti klare notitaj la sekvaj informoj: kompleta nomo de la aŭtoro, adreso, retadreso, naskiĝdato, titolo kaj tekniko. La interesitoj povas partopreni per desegnaĵo aŭ pentraĵo laŭ iu ajn tekniko, ne tridimensia, en mezuro 227 x 316 mm. Estos aljuĝitaj po unu premio al ĉiu el la tri kategorioj. La premio konsistos el argentina artaĵo. La konkursaĵojn oni sendu volvitaj, ne falditaj, al la sekva adreso:

Argentina Esperanto Ligo
At. Jorge Enrique Cabrera
Camacua 105 Piso 5 B
(CP 1406) CABA - República Argentina

Limdato: 15a de septembro 2013

PLIOFTAJ PARONIMOJ

Ĉifoje nia amiko VIGLO iom malviglas pro troa varmeco kaj tial pretigis mallongan serion da paronimoj. Ĉu ni pardonu lin?

Pesi *(Te)* mezuri la pezon de io
Pezi pro la altiro de Tero, fari kostantan premon sur objekton; esti preme ĝena, laciga, sufoka

Pesilo *(Te)* aparato por pesi
Pezilo *(Te)* metalmaso servanta kiel pezunuo

Peso *(Te)* ago de tiu kiu pesas; *(Fi)* monunuo en diversaj sudamerikaj landoj
Pezo forto rezultanta de la Tera altiro, mezurebla per pezilo; suferiga efiko; grava influo

Piĉo *(An)* vulvo k/aŭ vagino
Pitĉo *(prefere ol **Piĉo**) (Mu)* absoluta sonalto de tono, skalo aŭ voĉo

Pilolo *(Md)* medikamento malmola, globetforma; globforma objekto
Piloro *(An)* duodena orifico de la stomako
Pilorio kolono de malhonoro
Pirolo *(Bo)* g. (*Pyrola*) de malgrandaj, plurjaraj herboj; *(Ke)* heterocikla ringo, bazo de multaj derivaĵoj
Pirozo sento de brulumo en stomako
Pirulo *(Zo)* sp. *(Pyrrhula pyrrhula)* de paseroforma birdo kun blua kapo, griza dorso k ruĝa brusto

Pinio *(Bo)* sp. de pino (*Pinus pinea*), arbo kun platsupra branĉaro, kun fruktoj je glob- aŭ ovo-formaj lignaj konusoj entenantaj semojn el ligneciĝinta ŝelo k manĝebla kerno
Pino *(Bo)* g. (*Pinus*) kun ĉ. 90 specoj da pinglarboj, kies ligno estas utiligata por ĉarpentado k paperfabrikado
Pinjono *(Te)* malgranda dentrado, endentiĝanta kun pli granda dentrado; *(Ar)* uzendas prefere ***Gablo***

Pinto akuta k pika ekstremaĵo de objekto
Punkto malgranda interpunkcia signo; *(Te)* mezurunuo de longo uzata en tipografio
Punto *(Te)* delikata maŝplektaĵo, el kotonaj, lanaj aŭ silkaj fadenoj

Pipo Tubo kun forneto por bruligi tabakon k enspiri ĝian fumon
Pipeto *(Te)* vitra aŭ plasta tubo servanta por elpreni likvaĵon el ujo
Pipio *(Zo)* g. (*Anthus*) de paseroforma birdo

Pisti pecetigi aŭ pulvorigi per ripetataj batetoj
Piŝto *(Te)* masiva cilindro ŝovglitanta interne de alia cilindro

Placo *(Ar)* en urbo aŭ vilaĝo, libera spaco ĉirkaŭita de domoj
Plaĉo allogeco, simpatia inklino

Plado malprofunda, granda speco de telero; la manĝaĵo entenata en iu telero
Pladeto malgranda telero, subtaso
Plato objekto malpli dika ol larĝa k longa; *(Be)* granda ilustraĵo en libro; *(Ge)* supra k rigida parto de la Tero
Pledo proparolo de advokato
Plejdo *(Ve)* parto de skota kostumo; *(Ve)* vojaĝkovrilo el lanŝtofo
Plendo ago aŭ vortoj por esprimi ĉagrenon, doloron, malplezuron
Pleto plato el ligno, metalo, plasto ks por alporti telerojn aŭ aliajn manĝaĵojn
Ploto *(Zo)* sp. (*Rutilus rutilus*) de nesalakva fiŝo kun griza dorso

Plago granda longedaŭra katastrofo
Plaĝo sablorica strando, aranĝita por akceptado de feriantoj

Nia kara Viglo deziras, ke nia cerbo konserviĝu elasta, kaptema, unuvorte "vigla", tial denove li proponas al ni pli ol cerbotiklilon, kap-rompilon! Se vi sukcesos solvi ĝin, belan premion vi ricevos! Atente observu la sekvajn ciferojn kaj la nombron post la sageto, kaj diru, laŭ logika kriterio, kiun ciferon devas anstataŭi la demandosignon.

65245812 ⟶ 3	82942689 ⟶ 3
79265436 ⟶ 4	37423567 ⟶ 2
12327545 ⟶ ?	

Solvo de la Cerbotiklilo: "la 8 korvoj"

Neniu, ĉar la postrestintaj ne estis stultaj kaj tuj tuj forflugis!

*Gajnis libran premion **Galja Nikolova** el Sliven, Bulgario. Gratulojn al ŝi!*

NIA VIVO

Bildstrioj de Singer (Usono) – Komentoj de Viglo.
Nova etulo alvenas inter la vivuloj, esperplena kaj scivolema.

(daŭrigo venont-bultene)

Septembra Programo	
6-a, vendr.	19h00 - Unua, postferiada, renkontiĝo en TEA-sidejo: kiel vi pasigis la someron?
8-a, dimanĉo	Festo de Amikeco sur Monto *Forno.* Petu informojn!
10-a, mardo	18h00 - Ordigo de la asocia arkivo
13-a, vendr.	14h40 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: 9 minutoj kun... 20h00 - Filmo pri Erevano, ĉefurbo de Armenio - prezentos Edvige
17-a, mardo	18h00 - Ordigo de la asocia arkivo
20-a, vendr.	20h00 - *Te se ricordi, Trieste?* - Ĉu ci memoras, Triesto? - zorge de Edda VIDIZ
24-a, mardo	18h00 - Ordigo de la asocia arkivo
27-a, vendr.	20h00 - Esperanto en Interreto

Oktobra Programo	
1-a, mardo	18h00 - Ordigo de la asocia arkivo
4-a, vendr.	20h00 - Literatura vespero
8-a, mardo	18h00 - Starto de unuagrada kurso: prezento de la lingvo kaj enskribiĝoj; daŭrigo de duagrada kurso.
11-a, vendr.	20h00 - Ni pliriĉigu nian personan vortaron: serĉado de terminoj laŭ la temo SPORTO.
15-a, mardo	18h00 - Kursoj de Esperanto
18-a, vendr.	20h00 - *Abecé: un'escursione tra parole triestine, ricette, aneddoti* - Aboco: ekskurso tra triestaj vortoj, kuirreceptoj, anekdotoj, zorge de Edda VIDIZ
22-a, mardo	18h00 - Kursoj de Esperanto
25-a, vendr.	20h00 - Fotoj pri Israelo de Elda
29-a, mardo	18h00 - Kursoj de Esperanto

Trilanda montopinto

Laura Sancin, 1995

Geamikoj – venu, venu kun ni
sur la montosupron!
Almenaŭ unu tagon sen limobaroj:
kune ni marŝos
kune ni tie kantos
kune ni tie dancos
En kunestado pruviĝos nia simileco
Stariĝos demando: landlimoj kial ?
Eĉ unu tago sufiĉas
se en ni timo kaj baroj malaperos
Geamikoj – venu, venu kun ni
sur la montosupron
sur la trilandan pinton!

Ne plu ekzistas inter la tri landoj la limoj: nu, fizike ili ne plu ekzistas, sed mense? ĉu entute for!?! Tial daŭre aktualas ĉi ĉarma poeziaĵo de nia Laura: sufiĉas nur tie aŭ tie anstataŭigi land' *aŭ* lim' *per* mens'. *Meditu, homoj, meditu!*

Respondoj al demandoj pri Triesto (je 4-a pĝ):

1) Johann Joachim Winckelmann (1717-1768) estis arkeologo kaj historiisto pri germana arto. Li estis unu el la plej famaj teoriistoj kaj reprezentantoj de neoklasikismo. Pro sia verko "Historio pri desegnaj artoj ĉe la antikvuloj" (1764), en kiu la historio pri antikva arto estis priskribita surbaze de arkeologiaj eltrovaĵoj, li estas konsiderata la fondinto de la moderna arkeologio. Post vojaĝo en Vieno, maje 1768, kie li estis ricevita grandhonore de imperiestrino Maria Theresia, J. J. Winckelmann alvenis en Triesto (01.06.1768), mendis ĉambron ĉe la "Gastejo Granda", antaŭ la enŝipiĝo en la sekva mateno. En tiu hotelo li renkontis iun kuiriston, krimulon verdire, kiu nomiĝis Francisko Arkanĝeli. Ĉi fiulo, eksciiĝinte pri granda kvanto da juveloj de li ricevita donace en la Viena kortego, decidis forrabi la juvelojn. Je la 8a de junio la kompatinda historiisto estis murdita de Arkanĝeli, kiu post ĉirkaŭ unu kaj duona monato estis mortkondamnita kaj sekve ekzekutita.
2) Por rememorigi al estontaj generacioj, ke la ĉasŝipo Aŭdaca estis la unua ŝipo de la Reĝa Itala Mar-Armeo, kiu eniris la triestan havenon la 3an de novembro 1918.
3) La Lumturo pri la Venko altas 67,85 metrojn. Ĝi troviĝas sur la *Gretta*-monteto, je 60 m super la mara nivelo, sur la iamaj strukturoj de aŭstria fortikaĵo el la jaro 1854a, kaj estas dediĉita al ĉiuj maristoj kaj al falintoj dum la unua mondmilito. Ĝia konstruado ekis en 1923 kaj finiĝis en 1937, laŭ la projekto de arkitekto Arduino Berlam. La lumturo estas el blankaj ŝtonoj devenantaj el Istrio kaj Karsto. Sur ĝi lokita estas bronza statuo, verko de la skulptisto Giovanni Mayer, prezentanta la flugilhavan Venkon, altan 7,2 m-ojn.
4) Sur la kolono staras la statuo de Leopoldo 1-a el Aŭstrio, kies filo, Karlo 6-a, establis en Triesto la Sendoganan Havenon. La kolono estis starigita en 1663 en Placo Mara Puto *(Pozzo del Mare)* kaj poste, en 1808, translokigita en Placon de la Borso.
5) En la romia epoko la teatro estis konstruita marborde. En la postaj jarcentoj la maro retiriĝis kaj la teatro restis kaŝita de novaj domoj, kaj tiel perdiĝis la memoroj pri ĝi. En 1938 oni komencis malkonstrui parton de la malnova urbo, kaj tiam aperis la restaĵoj de la teatro.

Ni pliriĉigu nian personan vortaron

Ĉiumonate oni klopodos aranĝi ĉi programeron, kies celo estas provizi onin per kiel eble plej multaj terminoj rilate al diversaj temoj, kiujn vi mem proponos por ĉiu sekva renkontiĝo. Ni elektis traserĉadon de **SPORTAJ VORTOJ**: jam hejme bv. prepari liston de la plej kutime uzataj terminoj kaj kune ni kompletigos ĝin. Jen amuza maniero por lerni ion novan. Mi esperas vidi vin multnombraj!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21
Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
Grupa ttt-ejo: www.tea1906.altervista.org
Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349